

esperanto aktuala

Revuo de la Esperantista Brusela Grupo Numero 2 / 2022

Viu

Ukrainio

**En la printempo nepre vizitu la arbaron
de Halle**

La unuaj mapoj de Ameriko - 1500-1520

Mardon la
3an de
Majo
2022



Prelego
de
Bernard
Reĝis LARUE



Kartografio 4 : La unuaj mapoj de Ameriko 1500-1520

La 3-an de Majo, Bernard-Reĝis LARUE faris en De Pianofabriek la kvaran opuson de sia serio de prelegoj pri Kartografio kiu temis nur pri la 20 unuaj jaroj de la 16-a jarcento.

Antaŭ la komenco de la prelego ni helpe de Yves Nevelsteen ĉion instalas por ke la prelego estu sukcesa por la spektantoj en la salono sed ne nur, ĉar la prelego okazis ankaŭ tuje rete dissendita per la Zoom-programo. Yves faris la instalon de la materialo rilate al la reta aspekto de la prelego kaj ties filmado kaj registrado.

Dankon al li pro lia bonega laboro.


Oni povus atendi mallongan prelegon pro la mallonga periodo traktita, sed male ĝi abundis je informoj kaj Bernard-Reĝis montris multajn belajn dokumentojn, interalie mapojn, atlasojn, terglobojn...

Nepre ne maltrafu la 5an prelegon pri kartografio la 21an de Junio 2022.

Vidu la afiŝon lastpaĝe



Raportis Nikolao de Buyl

42a ELDONJARO. Aktuala estis fondita en 1976, de Léo De Bruyne, informilo kaj oficiala organo de EBG - Esperantista Brusela Grupo, societo centjara neprofitcela fondita la 10an de Februaro 1907, registrita en la belga ŝtata oficiala ĵurnalo « Belgisch Staatsblad, Moniteur Belge » kun la n° 0419498274, honorigita kiel reĝa societo ek de la 29a de Majo 1957.
 Redaktoro: JM Nicolas de Buyl: aktuala@esperantobruselo.org ; Aktuala elŝutebla: sites.google.com/site/ebgaktuala/ ;
 Prezidanto: Bernard-Reĝis LARUE : prezidanto@esperantobruselo.org , Kasisto: Jan Amadori : jan.amadori@gmail.com
 Sekretario: Ivo DE KEYZER : sekretario@esperantobruselo.org, Informoj/kursoj: Françoise Pellegrin: fransuaz@esperantobruselo.org Eventoj : JM Nicolas de Buyl nikolao@esperantobruselo.org
 Abono kaj membriĝo: Vidu la kotiz-tabelon, konto: IBAN : BE87 5230 8055 0794, BIC: TRIOBEBB de Esperantista Brusela Grupo, EBGa retejo: www.esperantobruselo.org, Fesjbukpaĝo: [Esperanto Bruselo](https://www.facebook.com/EsperantoBruselo), group-io: [Esperanto en Bruselo](https://www.facebook.com/EsperantoBruselo), Kunvenejo: « De Pianofabriek », Rue du Fort-straat 35, 1060 Bruselo,  Parvis de St-Gilles/St-Gillis Voorplein.
 Vidpunktoj de artikoloj en Aktuala ne nepre spegulas opiniojn de la ĉefa redaktoro aŭ de EBG.

A G E N D O

Bonvolu kontroli la ĝisdatigojn sur la [Kalendaro de la Brusela grupo](#)

Kursoj kaj kunvenoj okazas ĉiumarde en nia kunvenejo :

De Pianofabriek, 35 rue du Fortstraat, 1060 Bruselo.

Informoj ĉe fransuaz@esperantobruselo.org aŭ telefone +32 2 358 27 28

EBG faras alvokon al prelegontoj por plenigi sian kalendaron, bonvolu kontakti nikolao@esperantobruselo.org aŭ vespere 0478 382 981

APRILIO

Mardo la 19a	18:30 - 20:00	Kunveno en De Pianofabriek
Mardo la 26a	18:30 - 20:00	Kunveno en De Pianofabriek

MAJO

Mardo la 3a	18:30 - 20:00	  Prelego de B-R Larue pri Kartografio (4) : « La unuaj mapoj de Ameriko - 1500-1520 »
Mardo la 10a	18:30 - 20:00	Kunveno en De Pianofabriek
Mardo la 17a	18:30 - 20:00	Kunveno en De Pianofabriek
Mardo la 24a	18:30 - 20:00	Kunveno en De Pianofabriek
Mardo la 31a	18:30 - 20:00	Kunveno en De Pianofabriek

JUNIO

Mardo la 7a	18:30 - 20:00	Kunveno en De Pianofabriek
Mardo la 14a	18:30 - 20:00	  Prelego de Kristin TYTGAT pri BELARUSIO
Mardo la 21a	18:30 - 20:00	  Prelego de B-R Larue pri Kartografio (5) : « Portugala kaj Mediteranea kartografio en la 16a jarcento »
Mardo la 28a	18:30 - 20:00	Sezonfina vespermanĝo je loko difinota. Proponoj bonvenaj

JULIO - AŬGUSTO

Ĉiumardo	18:30 - 20:00	Kunveno en la trinkejo teretaĝe en De Pianofabriek
----------	---------------	--

Vorto de la prezidanto

Esperanto, lingvo de la Paco

Estas konata : Zamenhof kreis Esperanton kiel lingvo por paco. Ja li suferis de la tensioj inter la kvar komunumoj de sia naskiĝurbo, kaj tio instigis lin.

Mi ne dubas ke Esperanto povas utili al la Paco, sed eble eĉ pli kiel komunumo ol kiel lingvo : kiam vi rilatas kun foraj homoj, dank'al Esperanto, vi kreas ligojn kun ili, kaj tio helpas senti nin gefratoj tra la tuta mondo.

Tamen mi ĉiam pensis ke ankaŭ kompreni la alian povas malhelpi: per komuna lingvo vi povas ankaŭ des pli kompreni kiom la alia estas alia, stranga, fremda. Kiom vi malkonsentas pri iuj temoj.

Ja ne sufiĉas havi komunan lingvon : kiam ĉiu restas kaptita de siaj unuflankaj fontoj da informoj, malliberigita per propagando, komuna lingvo tamen ne sufiĉas por kompreni unu la alian... Ja ukrainoj kaj rusoj kutime ambau tute bone regas la rusan...

Sed ĉar esperantistoj kutime konas homojn trans landlimoj, trans kontinentoj, trans kulturaj kaj politikaj diferencoj, ne eblas same facile kredigi al ili ke la aliaj estas ĉiuj monstroj. Tio jam malhelpas propagandon de malamo.

Mi do esperas ke ni povos tiel helpi rekonstrui pacon.

Ĉar komuna lingvo ne sufiĉas por gardi pacon, indas rigardi kiel gravaj pacistoj agis. Mi havis la okazon povi prelegi en Kalmthout pri Bertha von Süttner, ricevinto de la Nobelpremio por Paco, kaj eĉ kunfondinto de tiu premio. Ŝi agis per libroj, prelegoj, kongresoj, paroladoj kun diplomatoj kaj parlamentanoj, ktp. Mi raportas pri ŝi en tiu-ĉi revuo.

Mi do deziras al vi pacon, sanon, kaj agrablajn renkontiĝojn en nia klubo !



Enhavo

Via prezidanto, Bernard-Régis LARUE.

Paĝo 2a : Kartografio 4 : 1500-1520

Paĝo 3a : Kolofono /Agendo

Paĝo 4a : Vorto de la Prezidanto
Enhavo

Paĝo 5a : Santé /Je via sano (Stromae)

Paĝo 7a : En la movado (eventoj)

Paĝo 9a : Recepto : La Fiadone

Paĝo 10a : TEJO kunlaboras por ...

Paĝo 11a : Masaĝo de la oreloj kaj okuloj

Paĝo 12a : Ĉu vi konas la bestojn de la farmbieno?

Paĝo 13a : Ĉu vi konas la bestojn de la arbaro?

Paĝo 14a : Forlasis nin Renée OST
EBGa Kotiztabelo 2022

Paĝo 15a : Albana 16-jarulo tradukis Eo-libron
Kion ĉi tiuj frazoj vekas en vi ?

Paĝo 16a : Bertha kaj Kalmthout

Paĝo 18a : BeNeLuksa Kongreso 2022 en Ipro
Nomoj de la bestoj (solvoj)

Paĝo 19a : Nia plantangulo: Anemono

Paĝo 20a : Venontaj prelegoj ĉe EBG



Kanto franclingva de la fama belga kantisto STROMAE kies vera nomo estas Paul Van Haver
<https://www.youtube.com/watch?v=P3QS83ubhHE>

À ceux qui n'en ont pas
 À ceux qui n'en ont pas
 Rosa, rosa
 Quand on fout le bordel, tu nettoies
 Et toi, Albert
 Quand on trinque, tu ramasses les verres
 Céline, bataire ¹
 Toi, tu t'prends des vestes ² au vestiaire
 Arlette, arrête
 Toi la fête tu la passes aux toilettes
 Et si on célébrait ceux qui ne célèbrent pas
 Pour une fois, j'aimerais lever mon verre
 à ceux qui n'en ont pas
 À ceux qui n'en ont pas
 Quoi les bonnes manières?
 Pourquoi j'f'erais semblant?
 Toute façon elle est payée pour le faire
 Tu t'prends pour ma mère?
 Dans une heure je reviens, qu'ce soit propre
 Qu'on puisse y manger par terre
 Trois heures que j'attends, franchement
 Il les fabrique ou quoi?
 Heureusement qu'c'est que deux verres
 Appelle-moi ton responsable
 Et fais vite, elle pourrait se finir comme ça ta
 carrière
 Oui, célébrons ceux qui ne célèbrent pas
 Encore une fois, j'aimerais lever mon verre
 à ceux qui n'en ont pas
 À ceux qui n'en ont pas
 Frotter, frotter
 Mieux vaut ne pas s'y
 Frotter, frotter

Al tiuj, kiuj ne havas
 Al tiuj, kiuj ne havas
 Roza, roza
 Kiam ni aĉe malordigas, vi purigas.
 Kaj vi, Alberto,
 Kiam ni tostas, vi kolektas la glasojn.
 Celja ? fraŭlino
 Vin ni insultas en la vestogardejo.
 - Ana, haltu
 La feston vi pasigas en necesejo.
 Kaj se ni festus tiujn, kiuj ne festas
 Unufoje mi ŝatus levi mian glason
 al tiuj, kiuj ne havas.
 Al tiuj, kiuj ne havas.
 Kio ? Belaj manieroj ?
 Kial mi ŝajnigus aliulon ?
 Ŝi estas ĉiel pagita por fari tion.
 Vi ne estas mia patrino.
 Post unu horo mi revenos, tio estu pura.
 Ni povu manĝi tie sur la planko.
 Tri horojn mi atendas, vere.
 Ĉu ili lasis nin por butikumi ? Aŭ kio alia ?
 Feliĉe, estas nur du glasoj.
 Voku vian estron.
 Kaj rapidu, via kariero povus finiĝi nun.
 Jes, ni celebru tiujn, kiuj ne festas.
 Denove, mi ŝatus levi mian glason
 Al tiuj, kiuj ne havas.
 Al tiuj, kiuj ne havas.
 Frotlavi, froti
 Pli bone ne
 Alfronti, alfronti

Si tu n'me connais pas
Brosser, brosser
Tu pourras toujours te
Brosser, brosser
Si tu ne me respectes pas

Oui, célébrons ceux qui ne célèbrent pas
Encore une fois, j'aimerais lever mon verre
à ceux qui n'en ont pas.

À ceux qui n'en ont pas.

Pilotes d'avion ou infirmières
Chauffeurs de camion, hôtesses de l'air
Boulangers ou marins-pêcheurs
Un verre aux champions
des pires horaires
Aux jeunes parents bercés par les pleurs
Aux insomniaques de profession
Et tous ceux qui souffrent de peines de cœur
Qui n'ont pas le cœur aux célébrations.
Qui n'ont pas le cœur aux célébrations

Se vi ne konas min.
Brosi, froti
Vi certe perdos vian
laboron brosi,
Se vi ne respektas min.

Jes, ni celebru tiujn, kiuj ne festas.
Denove, mi ŝatus levi mian glason
Al tiuj, kiuj ne havas.

Al tiuj, kiuj ne havas.

Aviadil-stiristoj aŭ flegistinoj,
Kamion-ŝoforoj, stevardinoj,
Bakistoj aŭ fiŝkaptist-maristoj,
Trinkaĵon al la rekorduloj
de la plej malbonaj horplanoj,
Al junaj gepatroj lulitaj de larmoj,
Al sendormuloj profesiaj,
Kaj ĉiuj, kiuj suferas pro kordoloroj,
Kiuj ne sentas deziron al festoj.
Kiuj ne sentas deziron al festoj.



• Rimarkoj :

1. Céline, **bataire**

• Céline = nomo de ino.

• 'bataire' = la vorto ne estas.

Oni uzas la sonon de la nomo kun kiu oni aludas al la franca vorto 'célibataire' kiu signifas "sen edzo".

2. Klarigoj pri la franca esprimo :

tu te prends des vestes = vi prenas jakojn al vi.

Tio signifas : Sperti neatenditan malsukceson; malsukcesi en entrepreno, en laboro, en ekzameno ; esti prifajfita [en teatro].

Tradukis Francine Sperber

Fonto j : <https://www.cnrtl.fr/definition/veste>

<https://www.languefrancaise.net/forum/viewtopic.php?id=>

★ **MEDITERANEA ESPERANTO-SEMAJNO (MES) 26/2 > 5/3/2022**

La aranĝo kiel kutime okazis estis iomete malsama ol la pandemio la organizantoj januaro konfirmi ke la hotelo postulis kompletan atestilon (ne pli ol 24 horojn ke la partoprenantoj ne gastoj. Kompreneble tiuj malebligis la partoprenon samideanoj. Nur kvardeko kvankam kutime la nombro



en Les Issambres. Ĉi-jare antaŭaj jaroj. Pro la povis nur la 30an de aranĝo vere okazos. La vakcinadon, plus freŝdatan antaŭ la alveno) por pruvi estis danĝeroj por la aliaj limoj malfaciligis aŭ eĉ de pluraj interesitaj de esperantistoj partoprenis atingis cent.

Tamen, la organizantoj, Monique kaj Simone, sukcesis fari de nia restado tre agrablan semajnon. La vetero estis bela, la ejo tre komforta, la manĝoj bongustaj kaj abundaj, la kursoj planitaj je diversaj niveloj, diversaj ekskursoj estis organizitaj, inter aliaj al Fréjus, al Saint-Raphaël kaj al Saint-Tropez. Dum la vesperoj okazis diverajn programerojn, inter aliaj prezentado de lumbildoj faritaj dum vojaĝoj, kantoj, teatraĵo, ktp.

La etoso estis agrabla, eĉ se ĝi estis malpli internacia ol kutime: ĉefe aliĝis Francoj, kvar Belgoj kaj unu Hispano. Mi tamen intencas partopreni denove en 2023. Espereble ni tiam ne plu devos timi pri pandemio.

Ĉeestis kaj raportis Clara BRACKE

★ **Post du jaroj da abstinenco, PEKO re-ekis !**

Ĉirkaŭ tridek personoj, de la 3a ĝis la 6a de Marto, partoprenis la renkontiĝon organizitan de la Verdaj Skoltoj en Tilff. Tilff estas ĉarma turista urbeto en la kruta valo de la rivero Ourthe. La programo estis riĉa kaj diversa.

Ni povis i.e. partopreni atelierojn pri muziko kaj desegnado, sekvi kurson por progresantoj...



☞ Ni aŭskultis prelegon de Lars Sözüer pri lia nova projekto « VERDEN » nova EU-projekto pri Daŭripoveco kaj Transporto, kunordigata de UEA.



☞ Ni ankaŭ malkovris la « freŝbakitan bebon » de la grupo de Verviers : temas pri turisma libro en Esperanto kaj en la franca, nomita « Esneux-Tilff ».

Gratulon al Eliane kaj al Eric !

Ni promenis en la belega valo de la rivero Ourthe sub printempa suno kaj revenis kontentaj sed ankaŭ tre malsataj....

Feliĉe, dum la renkontiĝo, ni estis dorlotitaj per la bongusta kaj abunda manĝaĵo preparita de la Verdaj Skoltoj !!

Ni ne forgesu mencii la biergustumadon de Valer kaj la ĉeeston de Gerd kun la libro-servo de FEL.

Kia etoso ! Kia ĝojo renkontiĝi denove fizike !

Kia plezuro « ŝufi » babilante kun amikoj vespere (ŝufi estas nova vorto inventita de Martine Rysenaer, kies signifo estas trinki bieron nomata Chouffe) !

Ni certe re-pekos venontan jaron kaj vi ?

Ĉeestis kaj raportis Fransuaz PELLEGRIN

★ En Marto okazis **STUDSEMAJNFINO en Almelo (NL)**



Ĉu vi scias ke Esperanto Nederland organizas dufoje jare sian Studsemajnfino ?

Temas pri studado de Esperanto je kvar niveloj (komencantoj, komencintoj,

progresantoj kaj spertuloj). Ĝi okazas en natuurvriendenhuis Krikenhaar, Bornerbroek



(gemeente Almelo).

Dum la lasta studsemajnfino (de la 25a ĝis la 27a de Marto), ni estis tri belgaj instruistoj : Lode Vandeveld, Piet Glorieux kaj mi.

Estas intensa studado. Imagu ke eĉ post la vespermanĝo, ankoraŭ estas unu horo de kurso....

Feliĉe ke poste, ni povis ĝui agrablan vesperon trinkante bieron, konstruante puzlon aŭ partoprenante tabloludon !

Ĉu tio allogas vin ?

La sekva studosemajnfino okazos de la 14a ĝis la 16a de oktobro . studosemajnfino@esperanto-nederland.nl

Ĉeestis kaj raportis Fransuaz PELLEGRIN

La Fiadono

Korsika recepto de François-Régis Gaudry (fama franca kronikisto pri kuirarto).

Tiu fromaĝa flaŭno el Bel-insulo (t.e. Korsiko) el « Brocciu » [broĉju] estas unu el la plej belaj gustmemoraĵoj de mia infanaĝo. Jen la aŭtentika recepto de « Mamyta », mia avinjo el Bastio. *François-Régis Gaudry*

Ingrediencoj :

- 500 gr da Brocciu, freŝa korsika ŝafina fromaĝo
- 5 ovoj
- 180 gr sukero (por la pasto)
- 1 vanilguŝo (opcia)
- 1 citrono ekologia (ŝelpecetoj)
- 1 sk vinbrando el la tipo « Grappa » (opcia)
- 1 pinĉpreno da salo

- 20 gr butero por ŝmiri la muldilon
- 20 gr sukero (por la muldilo)



Metu la ovojn kaj sukero en bovlegon kaj kunkirlu per forketo, aldonu la citronajn ŝelpecetojn, (la opcian vinbrandon), la vanilgrajnetojn kaj pinĉprenon da salo, kaj nur poste enŝovu delikate, daŭre per la forketo, la fromaĝon.

Buterŝmiru la muldilon, aldonu la 20 gr da sukero, kaj zorge turnigu la muldilon por bone dismeti la sukero ĉie en la muldilo. Ambaŭ, butero kaj sukero estigos belan karamelizadon dum la bakado.

Antaŭvarmigu la fornon

- je 180° C., se vi uzas altrandan malmunteblan muldilon, aŭ je 150° C. , se vi uzas tortmuldilon, poste enforngu la flaŭnon.

Antaŭ ol elmuldigi vian Fiadonon, lasu ĝin bone malvarmiĝi!

Vi povas konservi ĝin en fridujo dum maksimume du tagoj. Bonan apetiton!

Variantoj kaj aldonoj al la recepto de Fiadono (*el alia fonto*)

- Anstataŭigu la citronon per oranĝo
- Anstataŭigu la Brucciu-n per Provencia Bruso (brossa) aŭ Ricotta vintre laŭ sama kvanto.
- Aldonu supkuleron da faruno aŭ maizeno por obteni flaŭnon malpli humida.
- Se vi volas fari Ambrucciata-n version, simple enmuldigu pulvoriĝeman paston¹ (200 gr), kaj verŝu la Fiadonan miksaĵon en la tortfundon. Baku ĝin dum 30 minutoj je 180° C.
- Se vi aldonas farunon en vian Fiadonon, aldonu ĝin post la kirlado de la ovoj kun la sukero kaj la vanilaj grajnetoj. Aldonu poste la Brocciu-n aŭ Bruso-n.

Verkis Nikolao de Buyl

¹ pâte sablée / zanddeeg

TEJO KUNLABORAS POR

EŬROVIDO-KANTO EN ESPERANTO



EUROVISION

SONG CONTEST

TEJO, specife ĝia komisiono pri Kulturo, estas en kontakto kun San Marino RTV kun la celo sendi kanton de konata esperantlingva artisto al la Eŭrovido-kantkonkurso 2023. La malgranda lando jam antaŭe ofte sendis artistojn el aliaj landoj, kaj konsideras fari tiel denove venontjare.

Laŭ paroloj de Estraro kaj Kulturo-komisiono kun la elsenda organizo TEJO respondecus trovi unu aŭ du bonajn reprezentantojn de muziko en Esperanto, kaj ili partoprenus en konkurso antaŭ ĵurio kaj loka publiko. SMRTV momente ne volas promesi, ke kanto en Esperanto estos elektita, sed volas serioze konsideri la eblecon, kaj decidi depende de la prezentita kvalito.

TEJO pagus por la vojaĝo de la artistoj al Sanmarino, kaj organizus poste varbkampanjon pri la reprezentanta kanto kaj Sanmarino ene de la Esperanto-movado. Krom tio SMRTV esperas, ke la kuriozaĵo havi kanton en elpensita sed uzata lingvo tirus aldonan atenton al la lando. Rimarkindas krome, ke Sanmarino jam antaŭe havis specialan lokon en la Esperanto-movado, gastigante la Akademion Internacian de la Sciencoj en siaj landlimoj.

En la komisiono nun okazas diskuto, kiuj artistoj estus bona reprezento de nuna Esperanto-kulturo, kaj ankaŭ havus bonan ŝancon en la konkurso. Konataj nomoj kiel La Perdita Generacio kaj Jonny M estas nomataj, sed ankaŭ Asorti (kiu jam partoprenis en litova Eŭrovido-konkurso) aŭ Manŭel (kiu bone konektiĝus kun itallingva publiko).

Pliaj detaloj kaj progresoj estas legeblaj en la projektopaĝo :

<https://eo.wikipedia.org/wiki/%C5%9Cercotago>

Fontoligilo: <https://www.tejo.org/tejo-kunlaboras-por-eurovido-kanto-en-esperanto/>

Masaĝo de oreloj kaj okuloj



Premado de la akupunkturaj punktoj ĝingming



Frotado de la palpebroj



Masaĝo de la oreloj



Kovrado de la oreloj kaj frapetado de la okcipito



VID-NEBULIĜO kaj aŭd-malklariĝo ofte okazas al maljunuloj. Tiam protektado de la oreloj kaj okuloj estas tre grava por malfruigi la homan kadukiĝon.

Masaĝo de oreloj kaj okuloj estas unu el la sanigaj rimedoj por tiu celo. Sube ni prezentas kiel llin oni praktikas:

1. Premi ĝingming:

Meti la pintojn de la dika kaj montra fingroj sur la akupunkturajn punktojn ĝingming (la internaj okulanguloj) kaj prempuŝi la nazradikon per la fingropintoj pli kaj pli forte tiel, ke acideco kaj ŝveleco estiĝas en la premitaj lokoj aŭ etendiĝas al la okuloj. Daŭrigi la premadon unu plian minuton (Bildo 1).

2. Froti la palpebrojn:

Duonfermi la okulojn, fleksi la montrajn fingrojn, meti la duan falangon de la fleksitaj montrofingroj sur la internajn okulangulojn kaj froti la suprajn kaj malsuprajn palpebrojn respektive 30-50 fojojn de interne eksteren (Bildo 2).

3. Masaĝi la orelojn:

Kunmeti la fingrojn de la manoj, meti la manplatojn horizontale sur la orelojn, egale puŝfroti la orelojn per la manoj malantaŭen kaj antaŭen, faligante orelajn dorsojn, kaj froti llin 10-15 fojojn ĝis sentiĝas varmeto ĉe la oreloj (Bildoj 3 kaj 4).


4. Kovri la orelojn kaj frapeti la okcipiton:

Firme kovri la orelojn per ambaŭ manplatoj, metante la fingrojn sur la okcipiton, meti la montrajn fingrojn sur la dorsojn de la mezaj kaj frapeti per ili la okcipiton 15-20 fojojn. Subite malkovri la orelojn, tiam sono estiĝas en la oreloj. Ripeti la movojn 3-4 fojojn por vibrigi la timpanojn kaj akriigi la aŭdadon (Bildoj 5 kaj 6).

Milde faru tiujn ekzercojn matene kaj vespere ĉiutage. La ekzercoj estas utilaj ankaŭ al mildigo de la vid-laciĝo, orelzumado kaj aŭdamalfortiĝo.


Artikolo de Sun Ŭejljang eltirita el malnova numero de « Popola Ĉinio »

Ĉu vi konas la bestojn de la farmbieno?



Solvoj en paĝo 18-a

Ĉu vi konas la bestojn de la arbaro?




Solvoj en paĝo 18-a

Renée OST forlasis nin ...

Informo sendita de Herman Deceuninck.

Renée OST, iama membro de la Esperantista Brusela Grupo kaj prezidantino de la loka Esperanto-grupo de Halle inter 1987 kaj 1989 forpasis la 18an de Aprilo 2022 en la zorgocentro kie ŝi loĝis en Halle. La funebra ceremonio okazis la 23an en la Baziliko Sint-Martinus dum kiu familiano rakontis ke Esperanto estis por ŝi la lingvo de ŝia vivo kaj ke ŝi instruis ĝin. Renée ankaŭ estis prezidanto de la Esperanto-grupo en Halle inter 1987-1989 kaj tiu grupo siatempe ankaŭ organizis serĉpromenadon en Halle de kiu Herman ankoraŭ posedas la demandaron. La Grupo de Bruselo prezentas siajn kondolencojn al la familianoj kaj amikoj.



Renée Ost (maldekstre)

**Francine, Cécile,† Renée,†
Liliane kaj Dina en Halle
02-07-2014**



Nro	Kodo	Kategorio	Kotizo	Rajtoj
ESPERANTISTA BRUSELA GRUPO 2022				
11	MEM	Membro de EBG	15 €	Partopreno en la vivon de la Grupo
12	MEM-J	Membro - Junulo (< 26-jara)	10 €	
13	MEM-P	Membro - Pensiulo, senlaborulo		
14	FAK	Familia kunloĝanto	4 €	Partopreno en la vivon de la Grupo
15	+KUR	!! Aldona kotizo por kursanoj	+10 €	Kurso + materialoj
18	DVM	Dumviva membro de EBG	375 €	Membreco dum la tuta vivo (25 x MEM kotizo)

Albana 16-jarulo tradukis libron el Esperanto

La 16-jara albana esperantisto, Juri Andoni, sukcesis infanoj el la Esperanto-versio (Arne la ĉefido, de kaj eldonis ĝin. Plue li estis intervjuita de kelkaj televidstacioj inkluzive de la ŝtata kanalo n-ro 1 decembre 2021 kaj januare 2022.

Albana Esperanto-Asocio sukcesis eldoni julie 34 lingvoj inkluzive en Esperanton kun eseajo eminentulo Adem Demaĉi je titolo "Miaj granda ŝanco"; same decembre 2022 alian romanon de Fatos Kongoli, tradukita al Esperanto kunlabore kun la polo tradukisto kaj esperanto-Chmielik.

Baldaŭ aperos en Esperanto du aliaj albanaj romanoj de Visar Zhiti "La senfina funebra procesio" kaj de Adem Demaĉi "Patrino Shega kaj kvin knabinoj"

Artikolo provizita de Herman Deceuninck



traduki libron por Leif Nordenstorm) albana j r e s p e k t i v e

2022 libron en de albana prizonoj- mia albana ("La Perdinto") verkisto Tomasz

Kion ĉi tiuj frazoj vekas en vi ?

- 1- Ĉiam ni rigardas la pasintecon de malfermita fenestro en la muro de la nuntempo.
- 2- Post 8.000 jaroj, progreso estas ankaŭ progreso de malbono : neniam ĉi lasta estis tiel bone ekipita.
- 3- La amaskomunikiloj ŝatas dramigi la realon kaj preferas montri la falantan arbon ol la kreskantan arbaron.
- 4- Ĉiu sentis fundamentajn emociojn - la belecon de la naturo, arton, sporton, rideton de infano, k.t.p. - kaj, se necesas, devas konstrui sur ili, reveni al ili por trovi novan moralan energion.
- 5- Se mi premas la klavon "malĝojo", mi konsideros nur tion, kio mankas al mi, kaj multe mankas al mi: estaĵoj, tempo, mono, potenco, distroj, plezuroj. Tiam mi konsideros mian vivon malriĉa kaj frustrita.

Aliflanke, se mi premas la klavon "ĝojo", mi plezuriĝos ekzisti, gajiĝos havi tion kaj tion ĉi, ĝojos havi rilatojn kun tiuj kaj tiuj ĉi, kaj mi estimos mian vivon riĉa kaj kompleta.

- 6- La pesimisto diras: Tio ne estas bona kaj morgaŭ estos pli malbona.
La optimisto diras: Tio estas malbona, kion mi povas fari ?

Tiujn frazojn inspiris pensoj trovitaj en intervjuo de la franca verkisto Éric-Emmanuel Schmitt publikigita en la retejo de la franca revuo "Paris-Match" la 8-an de aprilo 2022.

Elfrancigis Francine Sperber

Bertha kaj Kalmthout

Kalmthout troviĝas ĉe la nederlanda limo, norde de Antverpeno. Tie kunvenas ĉiun trian ĵaŭdon de la monato simpatia kaj aktiva klubo. Mi, Bernard-Régis havis la plezuron iri tien prelegi pri Bertha von Süttner la 17an de marto.

Bertha naskiĝas en 1843 en Prago, el altranga nobela familio, en ilia palaco sur la centra placo de la urbo, nun okupata de la Ĉeka nacia muzeo. Ŝia patro, jam 76-jara, mortis antaŭ ŝia naskiĝo. Prago tiam estas parto de la Aŭstra-Hungara Imperio, la familio liveris multajn guberniestrojn kaj oficirojn, ŝi tiel estas aŭstrino.

Bertha lernas lingvojn, pianon, kanton, sed ne metion ĉar nobelulino. Kiam ŝi estas juna virino, la familio vizitadas akvo-urbojn, ĉefe en Germanio. Ŝia patrino certas pri sia kapablo venki en la kazino, do ŝi perdas la familian monon. Dume Bertha havas tutan serion da sinsekvaj fianĉoj, ofte maljunaj, sed neniu edziĝo realiĝas.


Fine en 1873, ŝi estas 30-jara, daŭre fraŭlino kaj komplete sen mono. Tial ŝi iĝas edukistino por la filinoj de la familio von Süttner. Tie naskiĝas amo inter ŝi kaj filo Arthur Gundaccar von Süttner. Kiam la patrino tion malkovras, en 1876, Bertha devas foriri al Parizo, kie ŝi iĝas sekretario de ... Alfred Nobel ! Ja mallonge: li reiras al Svedio, ŝi al Vieno por sekrete edziĝi kun Arthur. Ili fuĝas al Melegrio (nuna Kartvelio, tiam enigita en Rusio), kies princino, Ekaterina Dadiani, ŝi ekkonis en akvo-urboj.

Sed tie ili spertas militon inter Rusio kaj Turkio, kio igos ŝin pacema. Kaj por vivteni sin dume, ili verkas novelojn kaj romanojn por aŭstraj gazetoj, tiel ŝi iĝas verkistino. En 1885 ili revenas al Vieno, kun familia pardono.

Ŝi plu verkas, pli kaj pli filozofe kaj engaĝite. Ĝis aperas « Die Waffen Nieder », romano kontraŭ militoj, vidataj tra la okuloj de virino kies familia vivo estas grave trafita de kvar militoj. Tio iĝas unuaranga sukceso internacia. La esperanto titolo estas : « For la bataliloj ».

En 1890, ŝi helpas Felix Moscheles fondi Pacan Societon en Venecio, kun lia edzino Grete kaj la markizo Pandolfi, itala parlamentano, ano de la Internacia Paca Unuiĝo = porpaca asocio de parlamentanoj el la tuta mondo, daŭre ekzistanta. Felix Moscheles cetere iĝos la 1a prezidanto de la Londona Klubo Esperantista, vicprezidanto de Brita Esperanto Asocio, ano de la Lingva Komitato.

En 1891, ŝi fondas Aŭstrian Porpacan Societon. Kaj ŝi partoprenas, ankaŭ prelegante, en la Universala Paca Kongreso en Romo, unua el longa serio de aktiva partopreno. Alfred Nobel subtenis finance la Societon kaj pagis ŝian vojaĝon al Romo, poste ŝi regule petos lian subtenon, kion li donos. En tiu kongreso estas fondata la Internacia Buroo por la



Felix Moscheles



Alfred Hermann Fried

Paco, parte financata per la gajnoj el la itala traduko de « For la Bataliloj ». Bertha iĝas ĝia vicprezidantino, ĝis sia morto.

En 1892, kun Alfred Hermann Fried, ŝi kreas porpacan revuon kaj Germanan Pacan Societon. Ankaŭ li iĝos esperantisto, kaj verkos lernolibron kaj vortaron germana-Esperanta-germana. En 1895 ŝi ankoraŭ fondos Pacan Societon en Budapeŝto.

En 1893, Alfred Nobel proponas al ŝi donaci premion ĉiun 5an jaron, 6 foje entute, por propagando por paco. Bertha respondas ke la premio estu ĉiujara, por aktiveco por paco, kaj ne limigita. Tiel li inventis la Nobelpremion por Paco.


En 1898 aperas gazeta artikolo tra Eŭropo, kiu longe argumentas por Paco, inter alie ĉar milito tro kostas. La aŭtoro estas... Nikolao la 2-a, caro de Rusio ! Sekve oni organizas en 1899 Pacan Konferencon en Hago, inter la registaroj de la mondo. Dum multaj monatoj la diskutoj ne multe progresas. Sed Bertha tenas salonon en kiu la diplomatoj venas malformale paroli, kio helpas tamen atingi kelkajn rezultojn. La ĉefa estas la kreado de Konstanta Kortumo de Arbitracio = la unua internacia tribunalo de Hago, por solvi konfliktojn inter landoj per jura arbitracio anstataŭ per milito. Bedaŭrinde ne deviga...



En 1905 ŝi finfine ricevas la Nobelpremion por Paco, kiun ŝi mem helpis krei. Ŝi plu verkas, atentigas pri la estonta mondmilito, pri la apero de aeraj armeoj...



Ŝi mortis en 1914, 8 tagojn antaŭ la atenco de Sarajevo do la komenco de la unua Mondmilito. Dum ŝi vivis oni ofte primokis ŝian konstantan agadon. Sed nun ŝi estas honorigata : multaj stratoj portas ŝian nomon, ankaŭ lernejoj, konstruaĵo de la Eŭropa Unio en Bruselo, kaj ŝia portreto ornamas la kutiman version de la aŭstra monero de 2 eŭroj.



Mi varme rekomendas ke vi legu ŝian biografion far Petr Chrdle « Sen Laco por Paco » (16,50 €) kaj « For la Bataliloj » (36,60 €, ja 463 paĝoj).

Verkis la preleginto, Bernard-Reĝis LARUE

BeNeLuksa Kongreso 2022 okazos en Ipro

De la 23 ĝis la 25 de Sepembro 2022

BE-NE-LUX estas la nomo kiun oni donas al la regiono kiu konsistas el la landoj: BElgio, NEderlandoj kaj LUXemburgo



Ieper [Ipro] estis viktimumurbo (preskaŭ plene detruita) dum la Unua Mondmilito kaj la memoro pri tiu Granda Mondmilito estas ankoraŭ viva en la urbo kaj ĉirkaŭaĵo. Ne senkiale la urbo titoligas sin Pacurbo. Daŭre atestas pri la mondmilito grandega nombro de milittombejoj. La urbo ankoraŭ nun estas pilgrimejo por britoj, kanadoj, aŭstralianoj, novzelandanoj, hindoj kiuj perdis parencojn dum tiu milito. La Menenpoort [Menen-pordego] estas fama monumento en Ipro, kiu ĉiun tagon estas la scenejo de 'Last Post'-klarionsonado.

La 21a estas la Internacia Tago de la Paco. Kadre de tio, internacia UNESKO-komitato organizas internacian korus-pacfestivalon al kiu kontribuas multaj korusoj el la tuta mondo. Unu el la partoprenantoj estas la solidareckoruso "[Vamos pra Lutar](#)", kies membro estas Piet Glorieux, esperantisto. Li instigis la koruson partopreni kaj koncerti la 24an de septembro kaj estas la peranto inter la koruso kaj la centraj organizantoj. La kontaktoj okazas en Esperanto.

Sabaton la 24an de septembro Esperanto ricevas apartan lokon en la programo.

Koincide kun tiu evento la Flandra Esperantoligo (FEL) organizas Beneluksan kongreson. La koncerto de Vamos pra Lutar estos unu el la kulturaj programeroj.



Detaloj sekvos, vizitu la paĝon en Eventa Servo <https://eventaservo.org/e/BNLKS2022>

Nomoj de la bestoj de la paĝo 12 kaj 13

Bestoj de la farmbieno : 1. Kapro - 2. Numido - 3. Bovino - 4. Porko - 5. Kuniklo
6. Koko - 7. Vir-bovo - 8. Ansero - 9. Ŝafo - 10. Meleagro - 11. Ĉevalo - 12. Anaso

Bestoj de la arbaro : 1. Vipuro - 2. Kapreolo - 3. Cervo - 4. Mustelo - 5. Erinaco
6. Melo - 7. Vulpo - 8. Sciuro - 9. Pego - 10. Urso - 11. Garolo - 12. Apro - 13. Strigo

Nia plantangulo

Anemono arbara

Anemone nemorosa L. :

- Bosanemoon^{NL}
- Anémone sylvie / des bois^{FR}
- Buschwindröschen^{DE}

Anemono estas plurjara planto, familio : ranunkolacoj , kiu videblas ekde Marto ĝis Majo kutime en granda grupo en la arbaro, sed ankaŭ sur la vojflankoj. Ĝi preferas trapenetreblan grundon, kiu vintre estas iom malseka.


Ĝi estas indikilo por malnova arbaro.

La planto kun blankaj floroj, de 10 ĝis 25 cm alta, formas belan tapiŝon, sed post kelkaj monatoj nur restas la subtera parto. La rizomoj daŭre vivas, kaj printempe denove produktas foliojn kaj florojn.

Ĉiuj plantopartoj estas venenaj. La suko de la folioj kaŭzas ruĝajn makulojn sur la haŭto. La anemonoj kreskas iom pli frue ol al blua sovaĝa hiacinto (1): mi admiras ilin ambaŭ en Neigembos, 4 km de mia domo.

Kiel kulturvario ni havas plurajn plantojn kiuj ankaŭ hejmiĝis en multaj ĝardenoj; laŭ la specio ili havas blankajn, bluajn aŭ ruĝajn florojn, kelkfoje kun duoblaj floroj.

Aparte *Anemone coronaria* kaj *Anemone blanda* furoras.



(1) Ekde kelkaj jaroj la arbaro de Halle iĝis turisma celo pro la purpurblua flortapiŝo de sovaĝaj hiacintoj, tiom sukcesa, ke pluraj volontuloj helpas por ke oni respektu la regulojn (ekz. Nepre ne forlasu la padojn).

Halle estas trajne atingebla ekde Bruselo en 12 minutoj. Kiam la hiacintoj floras veturas speciala buso de la Suda Stacidomo al la arbaro.

La autorino aldonas : Per tiu ĉi rubriko « Nia Plantangulo » mi kombinas miajn 3 hobiojn : Esperanto, fotografio kaj amo por floroj (ĉefe sovaĝaj / hemjlandaj)

Iam mi prezentis lumbildaron en la brusela kaj genta kluboj, kaj dum PSI.

Nun mi elektas alfabetorde po unu planto en ĉiu Aktuala (iom hazarde)

Ne atendu biologiajn detalojn aŭ scian raporton, sed tamen troviĝos en tiu rubriko fideblaj datumoj kaj plie personaj anekdotoj (1)

Mi esperas ke la artikolo plaĉis al vi kaj instigos vin (re)malkovri la naturon.

Verkis Lydia BUYST. Fotoj Lydia Buyst kaj Nikolao de Buyl

Jenaj prelegoj ĉe EBG okazos ankaŭ rete



Mardon la 14an de Junio 2022
ĉe EBG en De Pianofabriek

Kristin TYTGAT
prelegos pri
malbone konata

BELARUSIO



Antaŭ nelonge Belarusio estis nekonata lando en Eŭropo. Ekde la pasinta jaro ni konsciigis pri ĝia ekzisto pro la protestoj kontraŭ la politika povo. Ankaŭ nun la lando ludas konsiderindan rolon en la milito en Ukrainio. En la prelego ni volas iom koncentriĝi je la historio kaj kulturo de Belarusio por pli bone kompreni la hodiaŭan situacion.

Mardon la 21an
de Junio 2022

Bernard-Reĝis LARUE
daŭrigas sian serion
de prelegoj pri:

Kartografio (5)

PORTUGALA KAJ
MEDITERANEA
KARTOGRAFIO
EN LA 16-A
JARCENTO



La portugaloj kaj la hispanoj estis la ĉefaj esploristoj en la 15a kaj 16a jarcento. Ni do kompreneble ŝuldas al ili kelkajn tre belajn mapojn kaj atlasojn en la 16a jarcento, kun reprezento de la mondo pli kaj pli kompleta. Tamen ili (la portugaloj ĉefe) malpermesis ke oni tro diskonigu tiujn novajn komercajn vojojn. Tial la italoj, kaj ankaŭ la germanoj, ofte produktis tiajn atlasojn anstataŭ la esploristoj mem. Mi montros al vi kelkajn ekzemplerojn de tiuj atlasoj, denove el mia kolekto.